

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



58a jaro n° 5
oktobro - novembro - decembro 1966

Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARAARCEF 59, BRUGGE tel. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
DOUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL DURWAEL IVO ISERENIANT ROGER

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYVLAAN 44, WILRIJK tel. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

HONORA VICPREZIDANTINO

PLYSON J.

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDELENA STRAAT 29 KORTRIJK
DR. DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRACHTEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE ROOVER R., LUCHEVAART STRAAT 28 BORGERHOUT

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS tel. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

POŤKONTO DE B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENS STRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

NIA PETICIO ESTAS TRANSDONITA AL U. N.

Ankoraŭ dum tiu ĉi sesio antaŭ la Ĝenerala Asembleo

La 6-an de oktobro seppersona delegacio, sub gvido de la prezidanto de UEA, Prof. D-ro Ivo Lapenna, transdonis al la subsekretario de la Unuiĝintaj Nacioj S-ro C.V. Narasimhan, la proponon pri solvo de la lingva problemo, pli bone konatan en la Esperanto-movado kiel « Peticio », kaj subskribitan de 920.954 individuoj kaj 3.843 organizaĵoj kun 71.165.000 membroj.

Samtempe estis transdonita al la subsekretario iom ampleksa dokumento en kiu estas klarigita la tuta problemo.

Post ioma interparolado, S-ro Narasimhan konsentis komuniki la ĵus transdonitan « Proponon » al la Ŝtatoj-Membroj, per speciala aldona dokumento, sub la punkto « Jaro de Internacia Kunlaboro », ankoraŭ dum la nuna sesio de la Ĝenerala Asembleo . . . Tio estas la maksimumo, kiun niaj delegitoj en Nov-Jorko povis momente esperi.

Esplorinte ankoraŭ la tutan situacion en Nov-Jorko, la prezidanto de UEA nun proponas ke la agado por la subskribokampanjo estu daŭrigata. Kaj la komitatanoj nun voĉdonas pri tiu propono. Sed ekzistas neniu dubo ke la Komitato akceptos tiun proponon, kies motivoj estas la jenaj :

a) daŭrigo de la kolektado de subskriboj por apogi la faritan proponon, donos bonegan okazon por plue informadi pri Esperanto kaj pere de la loka gazetaro, plej larĝan publikon ;

b) ĝi donos la okazon, teni la aferon vivanta ĉe Unuiĝintaj Nacioj per regulaj raportoj pri pliaj apogoj al la Propono (ekzemple de pliaj ŝtatestroj ministroj kaj eminentuloj ĉiuspecaj) kaj tiel fari premon je plua traktado.

c) la granda nombro de la jam atingitaj subskriboj certe plifaciligos la kolektadon de pliaj.

Kaj efektive, jam nun, konsiderinde kreskis la nombro de folioj alvenintaj en la C.O. en Rotterdam, post la lasta kalkulo farita antaŭ la transdono.

En mia duobla funkcio de estrarano de UEA kaj ĝenerala prezidanto de la Belga Federacio, mi do apelacias al ĉiuj niaj membroj-legantoj : al tiuj kiuj jam faris sian plenan devon kaj akiris kelkfoje mil, eĉ ĝis kvin mil individuajn subskribojn kaj kiuj certe pretos daŭrigi sian laboron ; sed ankaŭ al la multaj aliaj, kiuj ne jam faris sian eblon : kiuj eble mem ne jam subskribis la Peticion kaj kiuj certe ne subskribigis siajn parencojn kaj familianojn, siajn amikojn kaj konatulojn kaj kies ne-ekagado estis kaŭzo ke ni, ĝis hodiaŭ, ne atingis la miljonon da individuaj subskriboj.

Per la daŭrigo de la kampanjo la ebleco nun ekzistas ke ni tamen atingos tiun ciferon, kiu estus, ne : kiu estos, plej frapa propagandilo por nia ĝenerala, kaj speciale enlanda movado.

Mi plenfide antaŭdankas ĉiujn por ilia kunlaboro.

Maurice JAUMOTTE.

Al tiuj, kiuj ne estas individuaj membroj de U.E.A.

Estimataj kaj karaj gesinjoroj,

Vi scias, ke, estante membro de landa Esperanto-organizaĵo aliĝinta al U.E.A., vi estas membro de U.E.A. Tio signifas, ke vi apartenas kaj subtenas la mondan Esperanto-movadon. Pro tiu via membreco vi havas la rajton uzi la servojn de la delegitoj de U.E.A. Vi povas skribi peti informon el iu ajn eksterlanda urbo, kaj la delegito tie estas devigata respondi al vi. Ankaŭ survoje en eksterlando vi povas, ĉu buŝe, ĉu telefone, peti informojn de delegito, kaj tiu volonte donas ilin. Kion signifas tiu ebleco, mi la subskribinto ofte spertis.

Sed por uzi la servojn de delegito vi devas pruntepreni jarlibron de U.E.A. de iu, kiu estas individua membro de U.E.A., ĉar vi, kiu nur pere de la landa organizaĵo estas membro de U.E.A., ne havas tiun jarlibron kun la nomoj kaj adresoj de delegitoj.

En la landa Esperanto-gazeto vi certe povas legi iom pri la Internacia Esperanto-movado kaj la internaciaj agadoj kaj okazintaĵoj, sed la landa gazeto kompreneble nur parte povas enhavi ilin. Se vi vere deziras eluzi la eblecojn, kiujn vi kiel sciinto de la Internacia Lingvo Esperanto havas, necesas, ke vi abonu la revuon « Esperanto » kaj havu la jarlibron de U.E.A. Tio signifas, ke vi devas fariĝi membro-abonanto (MA) de U.E.A.

En 1967 la kotizo por MA de U.E.A. estas 340 Fr Bonvolu pagi pere de via grupo.

Ĉiuj estraranoj de U.E.A. ĝojos pri via aliĝo kiel individua membro, kaj mi, estrarano de U.E.A. pri financoj, ankoraŭ iom pli, ĉar estas klare, ke preso de ekzemple 1000 pliaj jarlibroj kaj 1000 pliaj ekzempleroj de la revuo ne multe plialtigas la elspezojn de U.E.A., kaj ke do per pli da individuaj membroj U.E.A. povas solvi siajn financajn problemojn.

Leganto de tiu ĉi artikolo, mi vin antaŭe bonvenigas kiel individuan membron de U.E.A.!

E. J. Woessink, estrarano
pri financoj de
U.E.A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cemento por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

Eble, multaj el la legantoj jam eksciis pri la preparata U.K. en Tel Aviv. Plej varme ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj partopreni tiun eventon. Por faciligi tion, U.E.A. organizas internacian karavanon kun 10-taga restado en la kongresurbo, dum restos je dispono post la Kongreso aliaj 10 tagoj por rigardi la landon.

Datoj de la Kongreso. — Pro la specialaj cirkonstancoj en Israelo la Kongreso okazos ne, kiel kutime, de sabato ĝis sabato, sed de merkredo la 2-a de aŭgusto ĝis merkredo la 9-a de aŭgusto 1967.

Forveturo. — Ĝi okazos dimanĉon la 30-an de julio 1967. La saman vesperon oni alvenos en Tel Aviv. La morgaŭan tagon oni povos ricevi la kongresajn dokumentojn, kaj oni havos 2 tagojn por konatiĝi kun la urbo kaj jam viziti vidindaĵojn antaŭ la Kongreso.

Reveturo. — Dimanĉon la 20-an de aŭgusto 1967 oni reflugos el Tel Aviv al Eŭropo. Sekve, oni havos 10 tranoktojn en la hotelo en Tel Aviv, kaj poste 10 tagoj oni restos por vidi la landon.

Postkongresa ekskurso. — Por tiuj 10 tagoj tre bela Postkongresa Ekskurso estas planata, dum kiu oni vizitos ĉiujn famajn lokojn. Detaloj pri tiu ekskurso estos publikigitaj kiel eble plej baldaŭ, sed jam ni povas anonci, ke oni konatiĝos i.a. kun Natanija, Haifa, Jerusalemo, Nazareth, la lago de Tiberio, la Morta Maro, la Ruĝa Maro ktp.

Dulitaj kaj unulitaj ĉambroj. — La ĉi sube indikitaj prezoj por la karavano validas por unu persono, sed antaŭviditaj estas dulitaj ĉambroj. Prefere do oni trovu personon por havi ĉambron kune. Unuopaj personoj, kiuj nepre deziras unulitan ĉambron, devas alpagi ekstran sumon por la tuto. Ankaŭ tio estas ĉi sube indikita.

Proksimumaj prezoj. — La indikitajn prezojn oni devas konsideri ne plene definitivaj. Ili estas validaj en la nuna momento, sed, unuflanke, se la nombro de partoprenantoj estos granda, verŝajne la prezoj povos iom malaltiĝi; aliflanke, dum unu jaro povos okazi iuj ŝanĝoj en la tarifoj, kiuj nun ankoraŭ ne estas konataj. Kompreneble, ni faros ĉion por teni la prezojn kiel eble plej malaltaj.

Vojo. — La prezoj validas por la vojlinio Bruselo - Tel Aviv - Bruselo.

U.E.A.-membreco. — La partoprenantoj en la karavano devos esti individuaj membroj de U.E.A. en 1966 kaj 1967 (minimуме MJ).

Prezoj. — La prezoj estas fiksitaj laŭ la jenaj 4 kategorioj de hoteloj:

Kategorio	Baza prezo	Aldono por 1-lita ĉambro
Luksa	19.300,— b.fr.	2.300,— b.fr.
Unuaklasa	18.400,— b.fr.	1.400,— b.fr.
Turistklasa	17.000,— b.fr.	1.400,— b.fr.
Triaklasa	14.750,— b.fr.	1.200,— b.fr.

En ĉiuj kategorioj la ĉambroj havas ban-ĉambron aŭ duŝon. La luksa kategorio antaŭvidas Hilton-hotelon.

Kio estas inkluzivita. — Ni ankoraŭfoje atentigas, ke la menciitaj prezoj inkluzivas krom la flugvojaĝo 10 tranoktojn en hotelo en Tel Aviv kun matenmanĝo kaj servinono, tiel ke tiurilate oni havos plu neniujn elspezojn. Plue, transportojn de personoj kaj valizoj inter flughaveno kaj hoteloj.

Anoncado. — Ĉiu, kiu intencas vojaĝi al la Kongreso en Tel Aviv per la flugkaravano de UEA, bonvolu anonci sin kiel eble plej baldaŭ ĉe S-ro G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51 Sint-Kruis. (Tel. 34935 - P.K. 291429)

Estas klare, ke ni povos atingi la plej favorajn kondiĉojn, se ni baldaŭ havos impreson pri la nombro de interesitoj. Tiuj, kiuj jam definitive decidis kaj antaŭpagas 20 % de la vojaĝsumo, estos registritaj kiel partoprenantoj kaj povos esti tute certaj pri sia loko en la karavano.

KAJ KARAVANO DE L.E.E.N.

En la nomo de la nederlanda Esperanto asocio L.E.E.N. S-ro Kervers organizos karavanon al Tel Aviv okaze de la 52-a Universala Esperanto Kongreso en 1967-a.

31/7/'67 forveturo: Amsterdamo 09.20 per Sabena flugmaŝino
alveno: Bruselo 10.05
f.: Bruselo 11.20 per CARAVELLE de SABENA
a.: Tel Aviv 18.10

31/7-8/8 Restado en Tel Aviv (tranoktado kun matenmanĝo en ĉambro por 2 personoj, privata banujo dependas de la de vi elektita nivelo de la hotelo). Dum ĉi tiu tempo oni estos tute libera.

8/8 Per aŭtobuso al Haifa por la forveturo (je la 22-a horo) per la (posttag-meze) luksa ŝipo « ENOTRA » al Piraeus voje de Larnaca (Cyprus).

11/8 Alveno en Piraeus (07.00 horo) Per aŭtobuso al hotelo (B-nivelo) kun kompleta pensio.
10.00 Tra Ateno per aŭtobuso (i.a. Akropolis, Nacia Muzeo, ktp) Posttagmeze: **Fakultativan** viziton al la templo Poscidon (nefor-geseblan sunsubiron en Kabo Sounion!).

12/8 08.30 Per aŭtobuso de la hotelo al la flughaveno.
Per CARAVELLE (SABENA) de Ateno (10.35) al Bruselo.

Do: Flugi per CARAVELLE al Tel Aviv, restado dum la kongreso en Tel Aviv, 3 tagojn sur luksa ŝipo (ripozi en freŝa maraero, ekskurso en Ateno), flugi al Bruselo/Amsterdamo.

Veran libertempo kun sufiĉe varma unua parto kaj refresiga parto sur ŝipo. Estas ideala kombinado!

Prezj: Fl. 1095 (kun C-nivela hotelo en Tel Aviv)
Fl. 1180 (kun B-nivela hotelo en Tel Aviv)
Fl. 1250 (kun A-nivela hotelo en Tel Aviv)
Fl. 1520 (kun Luksa hotelo en Tel Aviv)
Inkluzive: transporto laŭ la programo, tranoktado en Tel Aviv kaj en Ateno, dupersonaj ĉambroj en Tel Aviv. Dum la 3-taga ŝipvojaĝo kompleta pensio (oni dormos en 6/8 personkajutoj, en 4 personkajutoj pli Fl. 40).

Rimarkoj:

1. La vojaĝo realiĝos se minimume 25 personoj partoprenos.
2. Anoncado kiel eble plej baldaŭ. Lastan anoncon ANTAŬ 15-3-1967!
3. La unua pago ĉe la anonco estas Fl. 100 (aŭ 1400 B.fr.)
4. La saldon oni pagu antaŭ 1-6-1967.
5. Plilongigi la restadon en Tel Aviv kaj en Ateno estos ebla (sub certaj individuaj kondiĉoj).

Ĉi tiu vojaĝo estos planita kaj estos realigota en kunlaboro de la flugkompanio SABENA kaj la vojaĝoficejo Lissone Lindeman. Kompreneble la prezj estas kun rezervo kun rilato al neatentidaj intertempaj prezŝanĝoj de ekz. hoteltarivoj en Izraelo, ktp.

Pliajn informojn kaj anoncon ĉe: H. Kervers, Prezidanto de L.E.E.N., van Slingelandtstraat 22 's-Gravenhage (Nederland). Tel.: 54 21 86 - Ĝir-konto: 467401.

aŭ ĉe S-ro G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, Sint-Kruis (West-Vlaanderen), (Belgujo). Tel. 349 35. - P.K.: 29 14 29.

(Eventuale ni organizos en Belgujo Aŭtobusan transporton de via loĝurbo al la flughaveno).

49-a Kongreso de B.E.F.

PENTEKOSTO

KARLOREĜO

13/15.5.1967

Honora Komitato:

S-ro CORNEZ Provincestro
S-ro ABRASSART Distrikta Komisararo
S-ro HUBAUX Deputito — Urbestro de Karloreĝo

Loka Kongresa Komitato:

Fino ORSOLINI André Prezidantino
S-ro DEVILLEZ Marcel Vic-prezidanto (Eksteraj rilatoj)
S-ro DESTABELLE Roger Sekretario
S-ro PAULUS Raymond Kasisto — Kontisto / Traduka servo
S-ro GUILBERT Lucy Loĝiga servo

DIAMANTA JUBILEO DE LA VERDA STELO

40-jara Prezidanteco + 50-jara Esperantisteco de S-ro Maurice Jaumotte.
FIRMA PROGRAMO DE LA FESTOJ:

DIMANĈON, la 15-an de JANUARO 1967:

je la 9-a horo: **DI-SERVO** organizata de S-roj Jo Haazen kaj Eug.

Paesmans en la kapelo de la Kelzerstraat.

10-a horo: **SOLENA FESTKUNSIDO** (Internacia Marista Domo, Falconrui, 21).

12-a horo: **FORIRO** el la Intern. Marista Domo — per aŭtobuso — al la urbodomo, Grote Markt.

12,30-a horo: **AKCEPTO EN LA URBODOMO** fare de la urbeŝtaro.

13-a horo: De la urbodomo — per aŭtobuso — al la Festsalonoj « Magnus » Prins Albertlei 17, Berchem/Antwerpen.

14-a horo: **BANKEDO.**

18-a horo: Distra programo en salonoj **MAGNUS.**


19-a horo: Balo.

KOTIZO: 100 Fr.

Kotizo + bankedo: 300 Fr.

PAGOJ KAJ ENSKRIBOJ ĉe la kasisto: S-ro R. Balleux, Oude Donkiaan 83, Deurne - P.Ĉ. 726.54 La Verda Stelo Deurne (mencii: Jubileo de La Verda Stelo).

Sekretariejo: S-ro J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenweg 1078 Hoboken.



RABATO POR ESPERANTISTOJ

PROF. DRO. KOLOMANO KALOCSAY 75 JARA

Kiu en nia movado ne konas doktoron K. Kalocsay, almenaŭ laŭ famo se ne estas el liaj verkoj? Tiu aŭ estas (eterna?) komencanto aŭ esperantista primitivulo! K.K. naskiĝis en Hungara urbeto en 1891. Lin interesis ĉio! Kaj — ne malpli grave — li kapablis kompreni kaj studi ĉion. Kelkaj nomas lin mefistofela figuro. Mi emas kredi ke li estis pli faŭsta ol mefistofela figuro. Sed mi ne sufiĉe konas lin por esti certa pri tio. Li havis 20 jarojn kiam li interesiĝis al la problemo de la mondlingvo kaj studis esperanton ... kaj Idon, ambaŭ funde! Kio decidigis lin dediĉi sin tute al esperanto? Liaj kelkaj personpriskribantoj — ĉar biografon li ne ankoraŭ havas; sed espereble baldaŭ havos? — estas inter si ne konkordigantaj. Ĉu estis la « Interna Ideo »? Ĉu la lingva fenomeno? Ĉiukaze li poste ne skribis pri ideoj. Li okupiĝis tute pri literaturo kaj filologio. En tio li fariĝis giganto. Uunua poemkolekto estis « Mondo kaj Koro » originala. La ĉefa poemaro poste estis la vaste konata « Streĉita Kordo ». Tre alta liriko. Li estas ankaŭ fama pro tiuj bonegaj kaj ofte belegaj « Rimportretoj » en rondela formo. Troviĝas tie ankaŭ rimportreto pri nia Jan Van Schoor. Kiel tradukanto li komencis per « La Taglibro » de Goethe. Antaŭe jam komencita sed nur multe pli malfrue finlaborita estas la fama Hungara « Tragedio de la Homo » de Madach. Venis poste la « Infero » de Dante Alighieri; kaj « Reĝo Lear » de W. Shakespeare. Por la poezio havos daŭran famon lia « Eterna Bukedo » kun tradukoj el 22 lingvoj. De multaj poemoj li donigis al si la ĝustan priskribon; kaj tiam reverkis tradukon. Li kontribuis ankaŭ tre multe en la Hungara Antologio. Kun Prof. G. Waringhien li tradukis la « Floroj de l'Malbono » de Ch. Baudelaire. Ŝajnas ke grandega kolekto de tradukitaj pecoj, de el la antikvo ĝis nuntempo, estas preta. Ĝi baldaŭ aperu! Kiel gramatikisto li liveris kune kun G. Waringhien la majstroverkon « Plena Gramatiko » pri kiu, profesia filologo foje diris al mi ke ĝi tenas filologiajn konsiderojn kiujn li nenie antaŭe trovis. Ankaŭ valorega estas lia « Lingvo; Stilo; Formo ». La lastaperinta « Vojaĝo inter la Tempoj » — pri kiu vi povos legi recenzon en la venonta numero — atestas denove pri lia penetra menso, ankaŭ en tiu por li, kuracisto(!), fremda(?) kampo. Ĉar, por fini, ni devas tion diri ke li ne estas doktoro pri filozofio aŭ filologio, sed pri medicino; kaj kiel tia, ĉefkuracisto en Budapeŝta hospitalo, kaj docento ĉe la universitato. Li havas nun 75 jarojn ... kaj estas malsana. Li resaniĝu baldaŭ. Por li mem, por ni, kaj por la tuta homaro, klun li servas kiel kuracisto, profesoro kaj verkisto, kaj ne malplej kiel esperantisto!

La redakcio de « Sonorilo »

Esperanto-Ekspozicio en Bruĝo.

La Unuiĝo de la Esp.-grupoj en Bruĝo organizis, de la 23a ĝis la 26a de septembro, Esp.-ekspozicion en la teretaĝa salonego de la Urba Koncertejo.

La solena inaŭguro okazis vendredon 23-an, je la 18-a, en ĉeesto de diversaj oficialuloj: Senatano O. Carpels, Skabenoj De Meester, E. Traen kaj W. Neyt, urbaj konsilantoj Vanden Broele, Arnou kaj S-ino Mallet, kaj de delegitoj de kulturaj societoj: Juĝisto De Maeschalck por Willemsfonds; S-ro Ducheyne por Vlaamse Toeristenbond kaj S-ro Karlo Poupeye, por la Unuiĝo de Radio-Amatoroj.

La akceptantoj estis: por B.E.F.: S-ro G. Debrouwere; por Bruĝa Grupo Esp.: prez. Ch. Poupeye, vicprez. D. Demeulenaere kaj S-ino S. Verbeke-Vandenberghel, sekretariinoj: F-inoj Is. Van Parys kaj M. Willems; por Paco kaj Justeco: prez. Drs. F. Roose, vicprez. G. Maertens, sekr. C. Hinderyckx; por la eldonejo « Sonorillo »: Direktoro R. Iserentant; por la Junulara Grupo: Prez. Pol Blondelle kaj por B.E.J.A.: F-ino Yv. Poupeye.

Prez. Ch. Poupeye bonvenigis la oficialulojn, post kio li transdonis la parolvicon al Drs. F. Roose, kiu klarigis la celojn de nia movado kaj de la ekspozicio, por fine inviti Skabenon De Meester malfermi la ekspozicion, kion li faris per afabla paroladeto.

Gvidata rondirado de la salono sekvis kaj ankaŭ regalado kaj fine ankoraŭ publika dankesprimo de S-ro G. Maertens al S-ino Verbeke, dank'al kiu la ekspozicia materialo povis esti bonkondiĉe transportata.

La ekspozicio restis malfermita dum la tri sekvantaj tagoj kaj la laŭvice deĵorantaj samideanoj akceptis la viziton de pluraj centoj da interesuloj, kiuj plejparte atente aŭskultis iliajn buŝajn klarigojn.

La ekspoziciaj paneloj el Antverpeno, la libroj de la eldonejo « Sonorilo » kaj la Esp.-poŝtmarkoj konsistigis elokventan informan materialon kaj multaj propagandiloj estis disdonataj.

Resume: sukceso sufiĉe granda je la vidpunkto de la oficiala apogo kaj de la vizitado, sed ne sufiĉa — kompare al la farita penado — je la vidpunkto de varbado de novaj lernantoj.

TUJ ABONU « EL POPOLA ĈINIO » DE 1967

Jam komenciĝis kampanjo por kolekti abonantojn de 1967 por El Popola Ĉinio, sinteza kaj dumonata gazeto eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo. La kampanjo daŭras ĝis 28.2.1967. Ĉiu abonanto senpage ricevos belan Esperantan Kalendaron kaj ĉiu varbanto memorindan donacaĵon. Jarabono: 0-5-0. La koncertan faldfolion kaj provspecimenon de EPĈ oni povas peti senpage de ĝiaj diverslandaj perantoj aŭ rekte de la Libroservo de ĈEL, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

50-JARA ESPERANTISTECO KAJ

40-JARA PREZIDANTECO DE S-RO MAURICE JAUMOTTE

Kiam la antverpena Esperanto-grupo « La Verda Stelo » organizos sian 60-jaran jubileon la 15-1-1967, samtempe oni festos tre maloftan okazantaĵon : la koincida 50-jara Esperantisteco kun la 40-jara « verdstelana » Prezidanteco de S-ro Maurice Jaumotte.

Laŭ deziro de la jubileanto ni ne donu tre grandan diskonigon al tiu, (tamen eble unika), evento en Esperantujo !

Kiam ni komprenas tiun modestan deziron de S-ro Jaumotte, tamen decas ke ni, en konciza formo, grandlinie detalingu pri liaj aktivecoj.

Dum la unua mondmilito, en 1917, S-ro Jaumotte, en la komerca Altlernejo, sekvis la 4 unuajn lecionojn de Esperanto-kurso gvidata de S-ro Fr. Schoofs. Pro militaj cirkonstancoj li devis rezigni al ĝi. Tamen la lingvo tiel impresis lin ke, kiam post la milito S-ro Schoofs ree alvokis la iamajn kursanojn, S-ro Jaumotte venis al la unua kunsido kie li tuj estis petata prizorgi la gazetaran sekretariecon. Profesie estante ĵurnalisto li serveme akceptis kaj post la fino de tiu sama kunveno la sekretario de la grupo (kiu havas densan barbon) vokis S-ron Jaumotte aparte kaj, siavice, petis la transprenon de la grupa sekretarieco, ĉar liaj okupoj estis tiom ampleksaj ke li ne plu povis daŭrigi tian taskon.

« Post tiu malgranda unua kontakto neniam plu en mia tuta vivo mi revidis tiun barbulon ». Jen la frazo kiun S-ro Jaumotte plurfoje uzis por indiki kiamaniere li tuj estis akceptita en la estraro de « La Verda Stelo ». Li tuj estis aktiva, eĉ tiagrade ke li transprenis, en 1927, la prezidantan taskon de S-ro Schoofs kiu, antaŭvide al la organizado de la Universala Kongreso de 1928 en Antverpeno kaj de kiu li akceptis esti Prezidanto de la L.K.K., volis esti pli libera por sin dediĉi entute al la giganta tasko.

Ekde tiam la vivo de la nova Prezidanto Jaumotte, daŭre staris en la signo de Esperanto.

Ekde tiam li vere sin donis al tasko kiu iĝis sankta al li : laboradi por ke Esperanto finfine estu akceptata kiel internacia lingvo.



Talentplena homo, kies vido sur la problemoj estis (kaj ankoraŭ nun daŭre estas) tre klara, de la naturo ricevinta brilan elokventecon, temperamentplena kun giganta energio kaj senĉesa emo al laboro, honesta en siaj agadoj kaj kun pacienco mirinda kaj vere senlima, kun legenda afableco kaj optimismo enkuraĝia, li vere estis kaj restas ankoraŭ nun : la ideala Prezidanto kiu zorgas ke ĉio estas en ordo, ke ĉio ĝustatempe okazas, ke oni nenion forgesas, kiu antaŭvidas (grandega merito en movado!) la sekvojn de agado aŭ propono kaj kiu tra ĉiuj debatoj, ĉiuj entreprenoj, ĉiuj nebonaj rezultoj, momentaj malsukcesoj aŭ seniluziigoj, konservas tian nekompereblan optimismon kia entuziasmigas liajn kunlaborantojn kaj igas ilin daŭre kredi en la bono aŭ utilo de la propra tasko.

Nelacigebla verkisto, liaj sennombraj artikoloj pri Esperanto aŭ en Esperanto, ĉiuj senescepte, atestas pri lia senfina deziro al plikomprendo inter la homoj.

Antaŭ 3 jaroj oni festis en « La Verda Stelo » la 65-jaran datrevenon de lia naskiĝo !! Tie kie la aliaj ordinaraĵoj vigle pensas al ripozo, li — kontraŭe — prenis novan taskon sur sin : la kreado kaj organizo de internacia Esperanta aŭto-klubo kaj la eldono de aŭto-revuo !!

Antaŭ 3 jaroj oni elektis lin kiel estraranon de U.E.A. kaj kun ambicio li plenumas tiun taskon, akirante la respekton de siaj kunestraranoj pro la maniero per kio li tion faras . . .

Li estas Prezidanto de BEF jam dum jaroj kaj en 1960 li prezidis la LKK-on de la 45a Universala Esperanto-Kongreso en Bruselo.

Li gvidis multajn Belgajn Kongresojn kaj li estis la vera motoro en la kunfandiĝo de la iama Belga kaj Flandra ligoj . . .

Li estas la Prezidanto de la E.K.I.-Antverpeno (Esperanto-Komitato Intergrupa). Li gvidis nekalkuleblan nombron da Esperanto-kursoj . . .

Ni vere nin demandas kion li ankoraŭ NE faris . . .

Al Sinjoro Maurice Jaumotte, kiu estis kaj restas la « eterna junulo », ni gratulas tutsimple, sed tamen el la profundo de nia koro, kaj ni deziras — kune kun la kara edzino — longan vivon sed precipe : daŭran sanon !

BONVOLEMULO.

SEMINARIO POR GVIDANTOJ**3 - 10 januaro 1967**

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, sentante la bezonon pri baza kaj praktika eduko por siaj gvidantoj, iniciatis Praktikan Kurson en la serio de Seminarioj por gvidantoj. Ĝis nun tiuj seminarioj estis ekskluzive destinitaj por membroj de TEJO. En ĉi-tiu jaro ĝi tamen estos malfermita por ĉiuj internaciaj junularaj organizoj kaj iliaj naciaj sekcioj, kiuj kredas ke la kurso povus esti utila por ili. Ni kredas ke tiel ni agas konforme la rekomendon de la Unuiĝintaj Nacioj daŭrigi la agadon laŭ la spirito de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Loko: Bruselo. La kunveno okazos en la oficejo de la Unio de Internaciaj Asocioj. La partoprenantoj loĝos en la Junulargastejo « Sippelberg ».

Lingvoj: franca, nederlanda, esperanto, angla. Konsekutiva interpretado.

Kotizo: po 150 Bfr. por partoprenanto.

Loĝkostoj: kompleta pensio por 7 tagoj kostos 600 Bfr.

Rabato: Peto pri subvencio estas prezentita al la belgaj Aŭtoritatoj, por povi malpliigi la loĝkostojn.

Jen kelkaj programpunktoj:

Agadprogramoj, planado, labordivido, de ing. H. Bakker, estrarano de TEJO.

Gvidado de diskutoj kaj kunsidoj, de S-ro L. Verniers, honora ĝenerala sekretario de la Belga Ministerio por Nacia Edukado.

Strukturo kaj laboro de internaciaj organizoj en junularo, eduka kaj kultura terenoj, de D-ro G. P. Speeckaert, ĝenerala sekretario de la Unio de Internaciaj Asocioj.

Metodoj de administrado, teknikajoj, de S-ro P.A. Schillings, ĝenerala direktoro de la Internacia Instituto de Administraj Sciencoj.

Redaktaj teknikoj, lingvo, stilo, tradukoj, ĵurnalismo, tipografio, metodoj kaj kostoj de presteknikoj, de S-ro Maul, redaktoro.

Allaj publikigaj rimedoj, publika rilatoj, antaŭjuĝoj kaj stereotipoj, de D-ro L. Wecke, prezidanto de la junulara kaj studenta sekcio de la Tutmonda Asocio de Mondfederalistoj.

Ekskurso: vizito al internacia aŭ Europa institucio en Bruselo.

Kongresorganizado, de D-ro G.P. Speeckaert, kaj S-ro G.C. Fighiera, ĝenerala vic-sekretario de la Internacia Federacio de Vojaĝagentejoj.

(ne ĉiuj parolantoj jam definitive konfirmis sian kunlaboron)

Alĝadreso ne estis indikita. Ni konsilas ke interesigantoj turnu sin al G.C. Fighiera, Pippelingstr. 13, Brussel.

FONDAĜO POR LA DISVASTIGO DE LA INFORMADO DE ESPERANTO « JAUMOTTE-LOQUET »

Post la listo kiu aperis en numero 5/1965 de Sonorilo, ni publikigis ankoraŭ du aldonojn; ni nun reprenas tiujn aldonojn kaj publikigas ankaŭ du pagojn kiuj ĝis nun ne estis menciitaj kaj unu novan.

Transpreno (listo el nro 5/1965)	101.000 fr.
F-inoj M. kaj H. Hofkens (Antverpeno)	1.000 fr.
S-ro E. Paesmans (Antverpeno)	1.000 fr.
S-ino De Hondt-Hubens (Antverpeno)	1.000 fr.
Karloreĝa grupo	300 fr.
F-ino Cl. Peeters (Antverpeno)	1.000 fr.
S-ino Mention (Verviers)	500 fr.

105.800 fr.

Tiu sumo, deponita en plej sekuraj valorpapiroj aŭ ŝuldpapiroj, enspezigos al BEF cirkaŭ 7000 fr. poĵare, destinita nur por la informado pri Esperanto en nia tuta lando.

Ĉiuj donacoj al tiu fondaĵo do plifortigas la Esperanto-movadon en nia lando, ĉar la informado estas la plej necesa sed ankaŭ la plej multekosta laborplano de nia federacio.

NUR POR MEMBROJ KIUJ SENPERE PAGAS AL LA FEDERACIA KASISTINO

KATEGORIOJ		KOTIZO 1967
Naciaj		
BM	Bonfaranta membro	200
M	Membro	125
FM	Familia membro	50
JM	Junula membro (16-25)	50
KM	Kadeta membro (ĝis 16)	25
	Kursano	50
	Abono	100
Internaciaj (U.E.A.)		
MJ	Membro kun jarlibro	170
MA	Membro-Abonanto	340
MS	Membro subtenanta	510
Ab. + J-MA	Juna membro ĝis 21 jara	255
J-MJ		85
DV	Dumviva membro	6.800
	Patrono	3.230

LA GRUPKASIST(IN)OJ BONVOLU SENDI LA MEMBROLISTON EN TRI EKZ. DANKON.

Ensendojn por la januara-februara numero ni petas antaŭ la 1.1.67

1967 JARO DE LA TURISMO, diras UNO
JEN: « ESPERANTO-TURISMO, diras NI!

Tiu NI estas nia ĝenerala prezidanto, S-ro Maurice JAUMOTTE, kiu, kiel estrano de U.E.A. pri la fakoj, ankaŭ speciale pritraktas la pri-turismajn aferojn.

Ekde 1967, nia movado do kalkulos unu plian revuon, certe necesan en momento, kiam TURISMO iĝas unu el la plej gravaj interesajoj en la mondo.

La nova Revuo estas GRANDFORMATA, kun 24 paĝoj ABUNDE ILLUSTRITAJ, ne nur en nigra koloro sed ankaŭ en polikromio aŭ pluraj koloroj.

Ĝi aperos KVARFOJE en la jaro, — meze de ĉiu monattrio —, kaj la abonprezo estas B.FR.70. Tiu sumo estas pagota al la P.C. N° 1700.10 de la respondeculo S-ro Maur. Jaumotte, De Bruynlaan 44 WILRIJK.

La eldonanto, kiu estas ankaŭ prezidanto de la « Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista » sukcesis starigi kombinitan abonon al « ESPERANTO-TURISMO » kaj al « AŬTO-REVUO » kaj kiu kostos por la du revuoj, ne Fr. 70 + Fr. 70 aŭ Fr. 140, sed Fr. 70 por unu kaj NUR LA DUONON Fr. 35 por la dua.

Ĉar ankaŭ la « AŬto-Revuo » aperas kvarfoje en la jaro, — en la kumenco de ĉiu monattrio, — oni do povas akiri interesan revuon ĈIUJN SES SEMAJNOJN, kontraŭ pago de lomo pli ol cent frankoj. Ekzakte Fr. 105, pagotaj per simpla poŝtĉekĝiro.

Ni rekomendas tiun kombinitan abonon al ĉiuj niaj legantoj.

Rezenczoj

Rakontu, Samideano,

70 Pagoj ; 7,5 D. Kronoj.

Sano L. Friis havis la ideon demandi al multaj de li konataj gesamideanoj ĉu ili havas interesajn vivokazintaĵojn kun Esperanto kiel kaŭzo aŭ perado aŭ io ajn. Li ricevis tiom da atentindaj leteroj ke li decidis eldoni ilin. Antaŭ du jaroj aperis sekve la libro: « Sub la signo de la Verda Stelo ». Nu, tiu-ĉi libro estas fakte daŭrigo.

BOHUSLAN en Svedujo.

Pri tiu okcidenta regiono de Svedujo aperis bela, 4 folia, kolora prospekto. Estas la konata samideano, senatano Einar Dahl kiu tradukis ĝin. Helpus multe lian daŭran klopodadon se la gesamideanoj tre multnombre demandus ekzempleron de la nomita prospekto al la « Göteborgs och Bohus Läns Turisttrafikförbund », Drottningtorget, GÖTEBORG, Svedujo.

« Soveta Uzbekistano »

Pri tiu Soveta respubliko en centra Azio aperis 27 paĝa broŝuro. Ĝi priiraktas la geografion, ekonomion, etnografion, historion, famajn homojn, kulturon kaj esperanto-agadon de tiu malproksima kaj por ni tute fremda lando. Tre konciza ĝi estas samtempe brekaŭ kompleta. La apero de tiu publikigaĵo estas dankenda al Samideano, inĝeniero Petro Poliŝĉuk el la ĉefurbo Taŝkent. Oni gratulu lin kaj la komitaton tiean, petante ankaŭ alsendon de ekzemplero. Adreso: P. Poliŝĉuk, Novo-Moskovskaja 18, kv. 15; Tashkent Uzbekistan U.S.S.R. (Sovjet-Unio).

En ĝi dudek gesamideanoj rakontas unu sian sperton per, pro aŭ pri esperanto. La enhavo estas tre diversa. Precipe frapis mian senton ke preskaŭ ĉiuj estas bone skribitaj, do havas ian literaturan valoron. Kiel poeziplena estas « Sub la ĉielo de Italujo »! La « Edziĝfestoj » estas tiel bone priskribita ke ĝi kvazaŭ okazas antaŭ niaj okuloj! Komprenoble ke S-ro Friis devis presigi kiel « Esperanto savis homan vivon »! La « Rememoro » estas kortuŝa kaj la « Realiginta Revo » montras kiom da helpemo estas ofte ĉe esperantistoj. Mi legis nur du kontribuojn kiuj eble estas tro sensignifaj por aperi en libro. Mi vidis unu gramatikan eraron sur p. 22, linio 24, kie okulo ne povas esti en akuzativo. Mi konsilas ke oni legu kelkfoje la libron en grupkunvenoj. Kara leganto, vi absolute ne bedaŭros se vi aĉetos ĝin.

Teodoro Lahago «Moderna Esperanto» 56 paĝoj.

La aŭtoro, kiu naskiĝis en 1929, devenas de tre antikva Holanda familio, kaj havis iom aventuroplenan vivon. Li lernis esperanton... kaj trovis en ĝi erarojn. Ankaŭ ni. Ne konsiderante la fundamentan leĝon li komencis « plibonigi » la lingvon. Sed antaŭ ol fari definitivajn paŝojn en tiu direkto, li unue publikigis libreton: « The past, present and future » sub la nomo Professor Doctor Teddy Hagner. Li kiu estas nek unu nek alia prenis tiujn titolojn « to make his publication look more scientific... » (p. 54). Devas esti ke la artifiko sukcesis ĉar « The mail by sacks... came in. Esperanto and language movement magazines started to write articles » (sama paĝo). Mi, kiu tamen legas ne malmultajn de tiuj esperanto-kaj lingvorevuoj ankoraŭ neniam vidis eĉ unu artikolon pri li kaj lia projekto. Kaj nun la reformo mem. Alfabeto de nur 20 literoj. Ĉiuj literoj kun supersignoj estas for. Ni konfesu ke tiuj supersignoj estas efektive ofte handikapo. Ni tamen atendu lian (kompletan?) vortaron por juĝi. Ni vidis ankaŭ ke la vortoj kun prefikso « ge » estas sen j se temas pri unu paro (ekz. geknabo) kaj kun j se temas pri pluraj (ekz. geknaboj). Tio estas logika. Bedaŭrinde li reformas ankaŭ tie kie ĝi estas malplibonigo. Ekzemple: la adjektivoj ne plu prenas la pluralan formon. Li aliformigas ĉiujn vortojn kiuj pro la koincido de afikso povas havi du sencojn. Ekz.: la vorto « litero » ne plu taŭgas ĉar ĝi povas signifi ero de lito, lit-ero. Do: litereo. Li konservas la akuzativon, por la adjektivo. Neniu ŝanĝo al la uzo de la reflektivaj « si » kaj « sia » kiuj tamen iĝis: di. Tio sufiĉas por doni ideon. Kromprenoble ni malakceptas kaj la principon de ŝanĝo kaj la proponon. Tio kion oni povus fari estas: studi la ŝanĝendaĵajn aferojn en Esperanto sen publikigo aŭ propagando de ŝanĝita esperanto. Tio lasta estas io por kiam? Vidu la antaŭparolon de la Fundamento.

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140

Amalia Nunez Dubus « Eterneco ». Eldonis Hispana Esp. Federacio Av. Marina Morena 35/4º Zaragoza. Prezo: 10 pes.

Ĉarma legendo, en poemo verkita, el la lando de Navarra. Sur la 13 paĝoj estas tamen tro da preseraroj.

Helmut Arntz « Faktoj pri Germanujo » 3-a eldono de la « Informa Oficejo de la Federacia Registaro de Germanujo » 94 paĝoj. Prezo: 1 Us. Dol. aŭ 4 Germ. M.

Jam vaste kontata en la esperanto-mondo estas tiu ĉi libro pri okcidenta Germanujo. Ĝi estas jam la 3-a eldono kaj tio pruvas ĝian sukceson. La menciitaj faktoj iras ĝis kaj kun 1964. Multaj ilustraĵoj kaj statistikoj. Plej grandan spacon okupas la ekonomio; signo de la tempo (!). Se mendita po unu ekzemplero tiam ĝi estas senpage ricevebla; ĉe: Inter Naciones Referat Information, Kennedyallee 91-103, D 532 Bad Godesberg Germanujo. La prizorgantoj de la esperantlingva eldono tre esperas ke la legantoj bonvolos sciigi siajn opiniojn kaj juĝon al la Presse- und Informationsamt der Bundesregierung, Welckerstrasse 11, 53 BONN Germanujo. Tio estas ege grava i.a. por plia uzo de Esperanto far la Germanaj instancoj.

ANTVERPENO

ESPERANTO-GRUPO

« LA VERDA STELO »

Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝteĉnumero : 726.54 Deurne.

La 17-an de junio, dum kunveno prezidita de S-ro R. Van Eynde, parolado kun diapozitivaj de S-ro Fr. Schellekens okazis sub la titolo « Antaŭvido al la Libertempo ». La freskoloraj lumbildoj plaĉis kaj la komentario estis tre alloga prezentata. Poste diplomoj pri elementa kapableco estis transdonataj al F-inoj Hilde Lembrechts kaj M. De Maertelaere, S-ro Jo Haazen, nome de la ĵus diplomitoj, dankis la profesoron, S-ron H. de Roover, kaj varme pledis al la F-inoj por regule ĉeesti la kunvenon. S-ro de Roover konkludis per trafa dankesprimo.

La 24-an S-ro E. Paesmans organizis sian ĉiujaran promenadon tra Antverpeno. Li gvidis viziton de la katedralo apud la Verda Placo kaj konkludis ĝin per rondirado tra la ĉirkaŭaj stratoj. Je tiu okazo la vizitantoj estis agrable surprizitaj pro la sekretaj anguloj kaj la por la ĝenerala publiko neviziteblaj lokoj aŭ sanktaj domenoj. La vitraloj, la orgeno, la pentraĵoj de Rubens, la altaro, la ŝtonaj kolonoj, pri ĉio la gvidanto parolis kun granda scio kaj li certe meritis la laŭdajn vortojn kiujn la Prez. elparolis en apuda kafejo kie oni konkludis la vesperon per freŝa trinkaĵo.

La 1-an de julio S-ro R. Balleux organizis distran vesperon kiu sukcesis entute dank' al amuza kaj humorista enhavo.

La 8-an oni agrable kunestis kaj la 15-an oni kreis « Rakontan Vesperon » en kiu pluraj gemembroj kunlaboris. Eksterlanda vizito de kanadanino, F-ino Fl. Côté kaj de 2 konganoj el Bruselo gvidataj de S-ro P. De Smedt, estis tiom da neordinaraj faktoj en la kunsido kaj kreis veran internacian sferon.

La kunvenoj de la 22-a kaj 29-a staris en la signo de la libertempo.

La 12-an S-ro J. Verstraeten, ĵus reveninte el Budapeŝto, entuziasme raportis pri tiu grandioza evento en Esperantujo.

GRUPA VIVADO

La 19-an ne okazis kunsido pro la antverpena kermeso kaj la 26-an S-ro M. Jaumotte raportis kun sia konata viveco pri la 51-a U.E. Kongreso/Budapeŝto.

La 2-an de septembro la kunveno jam reprenis sian normalan aspekton. La kutimaj gemembroj — gefideluloj — rec aperis. S-ro R. Van Eynde tiam detale raportis pri sia vojaĝo al Anglujo kune kun edzino. La enhavo estis tiom ampleksa ke li devis interrompi kaj daŭrigi dum sekvinta kunveno, la 9-an de septembro, kiam li prezentis ankaŭ dokumentajn filmojn. Kiel kutime ili estis interesaj kaj variaj; precipe la filmo pri Hindujo kun ĝia giganta streĉado por venki nutrajproblemojn estis rimarkinda.

London, la 12-an la nova elementa kurso ne havis la sukceson dezirindan: nur 5 personoj enskribiĝis. Tamen la profesoro, S-ro H. de Roover plenkuraĝe ekinstruadis.

La 16-an kaj la 23-an S-ro Maur. Jaumotte per sia konata elokventeco kaj kun amaso da lumbildoj denove paroladis — entuziasme — pri sia vojaĝo al la 51-a U.E.K. tra Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo kaj Ĉeĥoslovakujo. La fakto ke li antaŭ 5 jaroj ankaŭ jam vizitis tiujn landojn, donis al li la eblecon kompari inter la iamaj kaj la nunaj vivkondiĉoj de la popoloj tie. Kun ĝojo li konstatis daŭran pliboniĝon sur preskaŭ ĉiuj terenoj. S-ro H. de Roover varme dankis la Prez. kaj la publiko fervore aplaudis.

La 30-an S-ro R. Van Eynde raportis pri la SAT. Kongreso en Swanwick/Anglujo kie li mem paroladis pri « La Gastlaboristoj en aliaj Landoj ». Li konas la manieron interesigi la aŭdantaron. La plej malgranda detalo foje donis al li motivaĵon por plej interese babili; fakto kiun la Prez. substrekis dum siaj konkludaj vortoj.

La 7-an de oktobro la verdstelanoj organizis mitulvespermanĝon en be-

MORTIS TYNEVERUM

Forfalis subite kaj multe tro frue, esperantisto kiun oni plenrajte povas nomi stelo en nia movado: S-ro Hector Vermuyten. Li estis apenaŭ 67-jaraĝa kaj ankoraŭ tute aktiva en la movado. En la eksterlando multaj konas lin nur per lia pseŭdonomo poeta Tyneverum. Li naskiĝis la 1an de oktobro 1899 en Antverpeno. Li montris artajn talentojn kaj estis premiita de la « Reĝa Flandra Konservatorio » pri deklamad-arto. Li iĝis urba oficisto kaj, kiam tiu sekcio eldonis apartan bultenon, li donis en ĝi parton al Esperanto, foje poeziaĵo, foje kroniko ktp. Kiam en 1930 estis forta opono inter Belga kaj Flandra Ligoj, li estis kaj restis membro de ambaŭ. Tio vekas tuj la impreson pri diplomatio. Sed tiuj kiuj konis lin, scias ke ĝi estis la sincera deziro akordigi kaj servi la du organizojn. En la sama spirito li estis membro de la du Antverpenaj grupoj. En la « Verda Stelo » li estis dum lomo da tempo la vicprezidanto. En la sama grupo li gvidis tre multajn elementajn kaj perfektigajn kursojn. Lia ĉefa merito estas tamen la literaturo. En tio li montriĝis vera esperantisto celante disvastigi la lingvon kaj samtempe diskonigi la popolojn unu al la alia. Estante Flandro li konatigis nian literaturon per bonegaj tradukoj. Lia monumenta verko estas la Flandra parto de la « Belga Antologio ». Ne nur li tradukis la plejparton de la elstaraj pecoj de tiu literaturo, sed li verkis valoran, enkondukan studon. Dualoke ni menciui la eldonon de malgranda poemaro de Guido Gezelle, kiu entenas kelkajn inter la mondfamaj de tiu pastro-poeto. La traduko estas nekredible bona, ĉar malfacilega estis la tasko. En manuskripto restis la traduko de ĉirkaŭ la triono de la mezepokaj « Legendo de Beatrico » kaj de « Renardo la Vulpo ». Kiu daŭrigos tiun verkadon? Estas ne eble menciui ĉiujn poemojn kiujn li verkis je diversaj esperantaj okazioj, ĉu kongresoj, ĉu aliaj renkontiĝoj. Same estis ne eble citi kiom da fojoj li gvidis la programojn de la grupkunvenoj. Kiel personeco, li estis inteligenta, humorplena kaj dolĉkarakterata. Tiu lasta trajto estas la plej alloga, kaj faris ke ĉiuj amis lin. Ne nur lia edzino, la plej forte frapata, sed ni ĉiuj perdis valoran samideanon kaj oran amikon. Li havu — kion li forte kredis — la eternajn ripozon kaj feliĉon. Niajn plej sentatajn kondolencojn ni prezentas al vidvino kaj familio.

La Redakcio de « Sonorilo ».

la restoracio meze de la urbo. Regis agrabla distra sfero.

La 1-an dum kunveno prezidita de S-ro H. de Roover, S-ro R. Van Eynde plenigis la rubrikon « Ĉirkaŭ la Fajro » per parolado sub la titolo: Diversaj diversaj. Li ĉefe skizis siajn travivaĵojn dum sia soldata servo kiam li apartenis al la eta belga maristara grupo. Li montris

tutan serion da fotoj el tiu tempo kaj plurfoje ridigis la aŭskultantojn per la humorplenaj diradoj kaj bildoj. Vizito al Laplando kun belegaj diapozitivaj konkludis la vesperon. La 21-an S-ro Fr. Schellekens denove paroladis pri Hispanujo prezentante mirinde belajn diapozitivajn.

La 29-an S-ro de Roover paroladis

pri « Bretonlando ». Amaso da detalaj estis montrata per diapozitivaj senescepte belaj kaj admirindaj je arta vidpunkto.

FAMILIA VIVO:

Kun plezuro ni povas anonci ke S-ro Ivo Durwael edziĝis kun F-ino Clara Claes el Aarschot, ankaŭ simpatiantino de Esperanto.

Al ambaŭ geamikoj ni deziras la plej bonan por la estonta vivo. Al la gepatroj kaj familianoj ni gratulas plej sincere.

Bruga Grupo Esperantista,

Reĝa Societo:

La 20-an de septembro estis prenataj la lastaj aranĝoj por la Esperanto-ekspozicio, organizita en kunlaboro kun « Paco kaj Justeco », de la 23-a ĝis la 26-a de septembro kaj pri kiu aperas aparta noteto.

Sekve al tia ekspozicio malfermiĝis nova kurso por komencantoj la 27-an de septembro. Malgraŭ la farita propagando, la nombro de enskribiĝoj ne estis kontentiga.

Dua leciono estis donata la 4-an de oktobro.

S-ro. G. Maertens montris la 11-an de oktobro multnombrajn kaj belegajn kolordiapozitivajn pri la karavano al la kongreso de Budapeŝto. Li kaj ankaŭ F-ino. M. Willems detale komentariis la belajn bildojn.

Pliaj lecionoj estis donataj la 26-an de oktobro kaj la 8-an de novembro.

PROGRAMO

FOR VENONTAJ KUNVENOJ

Kunveno: Strijdershuis, Hallestraat, 14. Tel. n° 347.98, ĉiŝfoje je la 20-a: kurso kaj je la 21-a: kunveno laŭ ĉi suba programo:

10-an de januaro: Debato: Por aŭ kontraŭ mini-jupoj.

24-an de januaro: Ĝenerala Jarkunsido. Raportoj kaj elektoj.

7-an de februaro: Karnavalaj amuzoj.

21-an de februaro: Debato: Lingvaj demandoj.

Krom tiuj povos okazi neprogramitaj kunvenoj je aliaj datoj; la membroj estos speciale alvokitaj.

GRATULOJ:

— Al F-ino. Christine VAN PARYS, membrino de BGE (fratino de du komitatanoj), kiu edziniĝis kun

S-ro. Joseph VAN PARYS apotekisto (samnomo sed ne familiano) dato: 23-7-66.

— Al Ges-roj. P. MILLECAM-LIN-SEELE, gemembroj de BGE, al kiu naskiĝis kvara infano, filo nomita KOEN (4-11-66).

INTERNACIA RENKONTIĜO DUM LA FOIRO EN LEIPZIG.

Esperantistoj vizitontaj la printempan foiron 1967, sabaton vespere, la 11-an de marto, havos la okazon en Leipzig esti en rondo de esperantistoj. Pro detalaj informoj oni skribu al: Esperanto-amiko en la Germana Kulturligo, GDR 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Strato 115.

« PACO kaj JUSTECO » BRUGGE
Sinte-Klaradreef 59, Brugge.
ESPERANTO-JUNULAR-GRUPO
Pr. Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.

Por komenci la novan laboraron estrarano André Dumarey redaktis enketon kiu estis sendata al ĉiuj gemembroj de Brugo kaj ĉirkaŭaĵoj por ekscii kiuj estas la (novaj) malhelpoj por veni al la grupkunveno, kiuj estas la plej ŝataj programpunktoj, ĉu estas sugestoj por novaj programpunktoj, ĉu estas interesiĝo por grupaj vizitoj al iuj kulturaj manifestacioj ktp ktp.

Denove ni havas la ĉiumonatan estrarkunvenon la unuan jaŭdon, ĉe estraranino F-ino Simone De Koninck, kiu ĉiŝfoje regalas per bonegaj kaj abundaj trinkaĵoj kaj frandaĵoj. Tio forte agrabligas la atmosferon kaj disigas eventualajn karakterkunpuŝiĝojn! Ni ŝuldas multan dankon al afabla Simone, kiu nun ankaŭ transprenis la gravan ŝarĝon de gardistino de nia mona trezoro.

Vicprezidanto Gr. Maertens bedaŭrigis ĉiujn kiuj ne iris kun li al Ĉeĥo-Slovakujo kaj al Hungarujo, montrante grandan serion da diaĵoj, kaj priskribante kolorriĉe tiujn vojaĝojn kaj kongresojn.

En unu de la grupkunvenoj la prezidanto prezentis la novan libron de Prof. Dr. K. Kalocsay: « Vojaĝo inter la Tempoj ». Sekvis vigla dis-

kutado. La ĉefa afero de la pasinta periodo estis la Esperanto-ekspozicio, aranĝita en kunlaboro kun la alia Bruga grupo kaj kun nia junulargrupo. Pri tiu evento vi povas legi apartan artikolon.

La 14-an de novembro la prezidanto de nia Nederlandlingva sekcio, S-ro G. De Brouwere rakontis pri sia vojaĝo al Meksikio kaj montris diapozitivajn denove belegajn. En ĉiu vojaĝo lia li kapablis penetri en la popolan vivon, kaj klare montri tion per la diaĵoj. Tial liaj konferencoj egalas tiujn de profesiaj turistaj specialistoj. Oni ĉiŝfoje tre multe lernas. F-ino Simone De Koninck iĝis specialista konantino de nia marbordo de kiu ŝi faris ankaŭ tre multajn diaĵojn. Tre baldaŭ ni povos admiri ilin.

Ni jam preparas la tradician Kristnask ofeston. Aparte tia festo okazos ankaŭ por nia junulara grupo.

Nia junulargrupo nun eldonas revuon « Tintilo » kiu enhavas doktrinajn artikolojn kaj kiu respegulas la vivon de tiu florenta grupo.

Grupfamilla kroniko: Kristanajn kondolencojn al nia prezidanto kaj al la tri membrinoj, Marie-Louise, Rose-Anne kaj Marie-Thérèse Roose pro la morto de ilia patrino, iama esperantistino.

Membro André Claeys, kiu jam ricevis la premion de la provinco Okcident Flandrujo pro lia romano « Het Duistere Rijk » (= « La Malhela Regno ») ricevis nun pro sama libro la trijaran premion de la Kolonia Instituto. Poste aperis lia dua kolonia romano « De Zonen van Cham » (= « La Filoj de Cham ») kaj ĵus aperis lia tria romano: « Pape Claus » (= « Ekleziulo Claus »). Sincerajn gratulojn kaj ankoraŭ fruktodonan literaturan verkadon; kun foje, eble, traduko en Esperanto!

CHARLEROI

La grupo havis standon en la « Salon des Arts Ménagers » (salono pri la mastrumaj artoj) dum 15 tagoj.

La sekretario S-ro Paulus estis intervjuata la 3-an de nov. antaŭ la Franclingva Belga Televido. Dum 5 minutoj li povis paroli pri Esperanto.

La 16-an de Novembro je la 19 h.,

nova kurso komenciĝis en urba lernejo kaj alia, la 19-a je la 14 h., en la klubejo.

Ni multe esperas ke tiuj kursoj havigos al la klubo novan forton kaj junajn helpontojn por la kongresa laboro.

Gratulojn al karloreĝa grupo

NAMURO: nova grupo.

Sabaton la 26-an de novembro okazis en Dave apud Namuro en la konferencujo de la kliniko « Sanitas », kunveno de kelkaj samideanoj el la regiono, laŭ la iniciativo de D-ro P. Denoël, Franclingva prezidanto de B.E.F.

Provizora komitato konsistanta el prez. Jacques Toint, docento en la Lovena universitato, sekretario Frato Robert Hellebaut kaj kasisto Pierre Piron, Intencas rekunigi la izolajn samideanojn kaj baldaŭ malfermi Esperanto-kurson.

Bonŝancon al la nova grupo.

VERVIERS

Tiu grupo havas kunvenon ĉiun duan mardon je la 20-a horo en la reĝa Ateneo. Jen la ĉefaj programpunktoj:

4-10: S-ino Héron: « Belga karavano al Budapeŝto »; kun lumbildoj.

18-10: S-ro Héron: « Historio de la Homaro (unua parto); de la apero de vivo sur tero ĝis naskiĝo de Eŭropo ».

8-11: S-ro A. Dohogne: « Historio de la moneroj ».

29-11: S-ro R. Demarche: « Vojaĝo tra Ĉeĥo-Slovakujo kaj Budapeŝto »; kun lumbildoj kaj aŭdigo de Tsigana muziko.

6-12: Rev. Pastro Muller (ĵus reveninta el Kongolando): « Katingo » kun lumbildoj.

Ni ĝojas anonci ke Esperanto nun estas oficiale agnoskata ĉe la reĝa Ateneo de Eupen, kie F-ino Smeets, profesorino pri matematiko, membrino de nia grupo, malfermis kurson en la kadro de la komplementaj aktivecoj. La kurso okazas ĉiutage dum unu horo, por la 5-a klaso, por 24 gelernantoj 12 - 14 jaraĝaj.

Ankaŭ en la Reĝa Ateneo de VERVIERS okazas en sama kadro kurso sub gvidado de S-ro Vanbreuse.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2 Abdijstr 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2